PILO-PRESS
Internacia
Informservo

Abonu Pilo-Press
Jara abonkotizo
30,-- GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69
Pĉk. Nürnberg
819 56-851



N-ro 15/78 - 12 aprilo 1978
Aperas ĉiusemajne

## Amadou-Mahtar M'Bow pri Esperanto

Luzern (pp) - Fine de marto okazis en la svisa urbo Luzern la kunveno de Monda Asocio de Lingvo-instruistoj. La 30-an de marto 1978 en tiu kunveno S-ro Amadou-Mahtar M'Bow, la ĝenerala direktoro de Unesko, parolis franclingve pri la lingvoproblemoj en plurlingvaj asocioj, ĉefe en UNESKO. Tiun prelegon ĉeestis ankaŭ Günther Becker, Blieskastel, iama ĝenerala sekretario de UEA, kiu informis nin pri la parolado kaj arango.

D-ro A. Baur, Winterthur, ĉefredaktoro de svisa gazeto kaj Esperanto-parolisto ĉe la Svisa Kurtonda Radio, kiu ĉeestis la arangon kiel ĵurnalisto, starigis la demandon, kial la ĝenerala direktoro de Unesko ne proponis kiel solvon de la lingvaj problemoj en tiuj asocioj Esperanton, kvankam li ja ĉeestis la Universalan Kongreson de Esperanto en Rejkjaviko? Responde al tiu demando s-ro Amadou-Mahtar M'Bow favore parolis pri Esperanto, pri siaj spertoj en Rejkjaviko, pri la batalo de la esperantistoj kontraŭ lingva diskriminacio kaj pri la rilatoj inter Unesko kaj UEA - dum preskaŭ 10 minutoj.

## Jarraporto de Belga Esperanto Federacio

Mortsel (pp) - El la jarraporto 1977 de Belga Esperanto-Federacio ni citas:

"1977 estis, almenaŭ laŭ mia opinio, iom pli vigla ol la antaŭaj jaroj, tiel sur federacia nivelo, kiel sur intergrupa tereno.....

Interalie stariĝis: Gazetara servo; du informcentroj - franc- kaj nederlandlingva; financa komisiono; laborgrupo aŭ kernestraro......

El...raportoj elmontriĝas ke:

nia membraro dum 1977 kreskis je 14,35 %,
la ŝtata subvencio plialtiĝis je 90,46 % kompare al la antaŭa jaro,
la diversaj laborgrupoj kontentige funkcias,
la kernestraro regule ĉiumonate kunvenis ĝis la lasta administrantara kunsido, sed depost tiam perdis iom la ritmon. (Pri tio verŝajne kulpas la ferio-monatoj, la universala kongreso kaj, laste sed ne malplej, la elekto de unu el niaj plej gravaj estraranoj - Gregoire - financministro de UEA. Ni ne forgesu, ke Gregoire pasintan jaron ankaŭ promociis al Kabinetataŝeo ĉe la Ministro pri Financoj en la Belga registraro)

....."

La jarraporton akompanas "morala raporto de la Sekretario" de BEF, kiun ni publikigos en venonta numero de Eŭropa Esperanto-Revuo.

## Pola Esperanto-Teatro en Belgio

Bruselo (pp) - Laŭ informo de Heroldo de Esperanto, la Pola Esperanto-Teatro, kiu gastos en la venontaj semajnoj en F R Germanio kaj ankaŭ ludos en Augsburg okaze de la Germana Esperanto-Kongreso, ludis en jenaj belgaj urboj: Liego (3.4.78), Antverpeno (7.4.78), Bruselo (11.4.78) kaj Brugo (13.4.78).

Kiel ni jam informis, la Pola Esperanto-Teatro komencos sian turneon tra F R Germanio dimanĉe, la 16.4.78 en Frankfurt-Nordweststadt.
Ni kore bonvenigas ilin en nia lando!

Pliaj informoj el Belgio

Mortsel (pp) - La Belga Esperanto-Federacio informas:
Nia estrarano, Grégoire Maertens, estrarano pri financoj de UEA, kiu pasintjare promociis al Kabinet-ataŝejo ĉe la Ministro pri financoj en nia lando, nun ricevis de la Eŭropa Ĉambro pri Evoluo de Komerco, Industrio kaj Financoj, la profesian diplomon kun ora medalo, pro la iniciato kaj direktado de la Eŭropa Esperanto Centro en Bruselo.
Al Grégoire niajn plej sincerajn gratulojn kaj dezirojn pri plia sukceso.

Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco en Kalmthout, Belgio, elektiĝis kiel BENELUKS-Geambasadoroj:

F-ino Diana Van Gompel, Verbindingsbaan 42, B-2260 Nijlen, Belgio

S-ro Luc Potiau, Parkstraat 21, bus 6, B-2700 Sint Niklaas, Belgio

La Gesinjoraj "Moŝtoj" pretas ĉeesti internaciajn organizaĵojn kontraŭ konsentotaj kondiĉoj.

Inter B.E.F. kaj ILEI-Belga Sekcio, ekestis interkonsento pri kunlaboro, cele al pli bona disvastigo de la Internacia Lingvo. ILEI aliĝis al BEF kiel faka asocio - restante tamen memstara asocio - kaj ellaboras agadplanon al kies realigo BEF helpos praktike kaj finance. Ni esperas, ke el tiu kunlaboro realiĝos bonaj rezultoj, precipe en la instruaj medioj.

Planoj ankaŭ ekzistas pri tia kunlaboro kun BEJA (Belga Junularo) por tiel akiri kiel eble plej larĝan agadterenon en nia lando.

Lumbildoj pri kongresa lando

Sofio (pp) - Eble tiuj, kiuj vizitos la 63-an Universalan Kongreson de Esperanto, deziras antaŭe konatiĝi kun la kongresa lando. Por ili estas preparitaj koloraj lumbildoj sub la titolo "Turisma panoramo de Bulgario" La lumbildprelego estas dividita en du partoj kaj prezentas diversajn objektojn turismajn, monumentojn ktp.

La unua parto enhavas 23 lumbildojn - de la Nigra Maro, de tipaj bulgaraj domoj, de folkloro, Rila Monaĥejo k.a. La dua parto konsistas el 21 ekzempleroj - ankaŭ el bildoj de la nigramara bordo, panoramo de la urbo Plovdiv, la templo-monumento "Aleksander Nevski" en Sofio, altmontaraj feriejoj ktp.

La klarigaj tekstoj por la apartaj lumbildoj ne ripetiĝas kaj donas novajn informojn. La esperanatistaj kluboj kaj organizaĵoj, kiuj volas prezenti tiujn lumbildojn al siaj klubanoj aŭ membroj, povas turni sin al la redakcio de "Heroldo de Esperanto", Bruselo, Belgio, por ricevi ilin. Pro la teksto - se la malnova jam estas nelegebla - oni turnu sin al la Loka Kongresa Komitato, bul. Hr. Botev 97, Sofio, Bulgario.

Reagoj - salutoj

Koregan dankon pro aperigo de la bela titolfoto pri ni du radio-aktivistoj en EER n-ro 1/78.

Hodiaŭ mi ankaŭ ricevis 2 ekz. de PILO-PRESS 13/78, kie jam aperis informo pri ŝanĝo de niaj zagrebaj radio-elsendoj. Kompreneble, PILO-PRESS denove estas la unua, kiu tion aperigis. Neniu kapablas rilate rapidan informadon, venki Vin!
Zagreb, la 6-an de marto 1978 Tre kore Emilija Lapenna

Du amikoj-esperantistoj sendas al vi varmegajn salutojn - precize tiajn, kiaj estas nun la sunradioj en Taŝkento kaj same sincerajn, kiel la internacia esperantista amikeco.
27.III.1978 Jerzy Grum kaj Petro Poliŝĉuk

*************************

Ne forgesu skribi al la Esperanto-radiostacioj!

Aperta Universitato Esperantista

Lodzo (pp) - La 8-an de aprilo 1978 okazis la solena inaŭguro de Aperta Universitato Esperantista (AUE) en la pola urbo Lodzo. AUE starigas al si jenajn celojn:

Plu disvastigi Esperanton en la scienc-esplorajn, didaktajn mediojn, en la profesiajn kaj kulturajn societojn pere de kunpartopreno en la agado kaj servado.

Plenumi la bezonojn de la esperantistaro en la popularsciencaj kaj kulturaj temoj, arangante lekciojn, prelegojn, seminariojn, konferencojn, konkursojn, prilaborante kaj disvastigante eldonaĵojn, bendojn, filmojn ktp.

Doni al la esperantistoj la eblon prezenti siajn sciencajn esplorojn, siajn artajn kaj organizajn akiraĵojn kaj stimuli al gvido kaj apliko de esploroj por la esperantistaro kaj la internacia lingvo.

Riĉigi kaj perfektigi la sciencan kaj profesian Esperanto-terminaron.

Preferigi la sciencajn, teknikajn kaj kulturajn branĉojn, kiuj estas la ĉefaj kondukiloj de civiliza progreso kaj ĉion, pri kio interesiĝas la vastaj socirondoj.

Eva Pawlikowska

La semajna komentario de ORF-Esperanto-elsendo de 1./2.4.78

La semajna komentario de ORF-Vieno, plume de d-ro Alfred Macher, tekstas:

"Neniu eksterlanda, sed iuj aŭstraj gazetoj kalumniis nian registaron kiel perfidan al UNO, pro tio, ke ĝi ne permesis translokigon de la aŭstra UNO-trupo al la Suda Libano, antaŭ ol ĉesos tie la militagoj. Ĉar la tasko de nia UNO-trupo ja estas sekurigo de la paco, ne sin-enmikso en malpacojn.

Kaj vere, Aŭstrio jam multon oferis kaj ankoraŭ oferas al UNO. Ĝi helpis konservi la pacon en Kongo, Cipro, Sinsi, kaj Golan. Ĝi disponigas al UNO - praktike sen pago - grandiozan novan ofic-sidejon kaj kongrescentron: la tiel nomatan UNO-City. Krom tio UNO ankoraŭ ŝuldas al Aŭstrio konsiderindajn sumojn.

La opozicio kritikas ankaŭ la komerc-celan viziton de kanceliero Kreisky al la Germana Demokrata Respubliko, asertante, ke li devus vojaĝi orienten ne pli ofte ol okcidenten. Tiu kritiko pretervidas, ke por la komerco kun la okcidento, ĉar sur privata bazo, ne bezoniĝas ŝtat-organoj, sed jes por la komerco kun la komunisma oriento.

Sendube, tiuj vizitoj akcelas nian var-interŝanĝon kun Sovetunio kaj Germana Demokrata Respubliko, kvankam montriĝas nova malfacilo: La Comecon-landoj rifuzas, pli kaj pli, pagadon per "malmolaj" devizoj. Ili postulas interkompenson de la negocoj - kiel en la tempo postmilita.- Nu, la aŭstra ekonomio superos ankaŭ tiun baron."

La liturgia semajna penso, zorge de P. Jacobitti

La liturgia semajna penso de Radio Vatikana de la 2.4.78 tekstas:

"En la evangelio de la oka tago post la resurekto de Kristo ni havas la rakonton de la unua apero de Jesuo meze de liaj disĉiploj en la vespermanĝejo. Sed la akcento estas donita eĉ pli al la dua apero, okazinta en la sama vespermanĝejo, la unua kristana preĝejo, kaj en la oka tago post la resurekto, jam nun, la sankta tago de l' Sinjoro. La neesprimebla ĝojo de ĉiuj disĉiploj hodiaŭ komunikiĝas ankaŭ al Tomaso: ĝi fariĝas senescepte plena por la tuta Eklezio. Jen Jesuo sin direktas ĝuste al li, kiu ne ĉeestinte dum la unua apero, rifuzis kredi kontraŭ la ĝojega aserto de ĉiuj. Rigardu - invitas lin Jesuo - tuŝu miajn vundojn! Tomaso sin ĵetas genue antaŭ la piedojn de la Sinjoro kaj ravite krias: Mia Sinjoro kaj mia Dio! Ĉu oni povas imagi pli grandan ĝojon ol tiu, por li kaj por la tuta Eklezio!? Surprize ni aŭdas el la sama buŝo de Jesuo: Pli beataj estos tiuj, kiuj ne vidinte, kredos! Kaj kun jubilo ekde tiam la tuta Eklezio, kaj ni kun ĝi kantas: Jesuo vere resurektis: Haleluja!"

## Gravaj ŝanĝoj en Ĉinio

Post la "likvido de la kvarpersona bando" en Ĉinio okazas gravaj ŝanĝoj. Ĉinio sin malfermas al la okcidento, al mondo. Tiun ŝanĝon oni rimarkis en la eldonagadoj de Fremdlingva Eldonejo en Pekino, en la revuo "El Popola Ĉinio" kaj nun ankaŭ en la Esperanto-elsendoj de Radio Pekino. La informoj kaj raportoj de Radio Pekino fariĝas pli konkretaj, mankas la "grandaj vortoj". Kun surprizo ni aŭdis lastan sabaton, la 8-an de aprilo, je la 21-a horo, sur ondo 31 m, krom aktualaj informoj el Ĉinio artikolon en la aprila numero de "El Popola Ĉinio":"Rememoroj pri Ĉina Proleta Esperantista Unio" de Ĉ. Ĉen. La elsendon ni komprenis en Nürnberg tre bone kaj klare. El la nomita artikolo ni citas la finajn vortojn: "La aktivadoj de Ĉina Proleta Esperantista Unio jam fariĝis historiaj faktoj, tamen ĝia gvida penso, t.e. instruo de Prezidanto Maŭ Zedong preni Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian, ankoraŭ stimulas nin antaŭen. Kompare kun tiuj de Ĉina Proletara Esperantista Unio antaŭ pli ol 40 jaroj, multe pliboniĝis nun niaj kondiĉoj. Ni tute povas kaj devas pli efike labori por la interesoj de la popoloj de Ĉinio kaj ĉiuj landoj de la mondo per nia lingvo Esperanto."

Intertempe aperis ankaŭ la aprila numero de EPĈ kaj alvenis en Nürnberg. La bele ilustrita revuo sur 52 paĝoj malfermas siajn paĝojn ankaŭ al Esperanto-temoj. Krom la jam menciita artikolo "Rememoroj pri Ĉina Proleta Esperantista Unio" (3 paĝoj) oni povas legi leterkeston kun opinioj de diverslandaj esperantistoj, rubrikon "Korespondi deziras" kaj la rubrikon "Nove ricevitaj libroj" kun mencio de Interlingvistika Informa Servo, jarkolekto 1977 kaj de tri Esperanto-dokumentoj de UEA.

## Pri la Beograda renkontiĝo kaj la neŭtrona bombo

Ĉu la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo kaj la Renkontiĝo de Beogrado, kiu finiĝis nur la 9-an de marto, jam estas forgesitaj? Pola Radio ja disaŭdigis tuj post la finiĝo de la Beograda Renkontiĝo mallongan komentarion kaj poste - en sia informĵurnalo - konstatis, ke Moskvo pozitive taksas la rezultojn de Beogrado. Sed poste, regis silento pri Beogrado. Ĉu Helsinki kaj Beogrado momente estas "malŝatataj temoj"?

Malonga estas nur la fina dokumento pri Beogrado, kiu enhavas ĉefe jam konatajn konstatojn sen multa estonta efiko. En la dokumento ja "estis rekonite, ke la interŝanĝo de opinioj per si mem estas valora kontribuo por la atingo de la celoj fiksitaj de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro, kvankam esprimiĝis diversaj opinioj pri la ĝis nun atingita grado de la efektivigo de la Finaj Aktoj", sed oni ankaŭ konstatas, ke "pri nombro de proponoj submetita al la Renkontiĝo ne estis atingita interkonsento."

Malpli multon en la Esperanto-elsendoj de Pola Radio oni aŭdis lasttempe pri malstreĉo en Eŭropo, kiu en antaŭaj monatoj estis ofte citita kiel "ne-returnebla" fakto. En la lastaj semajnoj ankaŭ Pola Radio plenumas intensan kampanjon kontraŭ la neŭtrona bombo, en informoj kaj komentarioj. La rajto je vivo en paco dominas la Varsoviajn elsendojn. Ankaŭ ORF Wien en sia lasta elsendo komentarie sin okupis pri la neŭtrona bombo kaj la danĝeraj lokoj en la mondo. Ankaŭ ni opinias, ke necesas nova SALT-kontrakto inter USONO kaj SOVETUNIO kaj politikaj solvoj en Afriko kaj en Proksima Oriento, Ne-uzo de perforto validu en la tuta mondo - en la intereso de la suferantaj homoj kaj en la intereso de Esperanto, kiu nur povas prosperi en paca mondo.

La Esperanto-Ekspreso de Pola Radio memorigis la 4-an de aprilo 1959, kiam unuafoje eksonis el Varsovio Esperanto, je la 16,30 h. La E-elsendoj el Varsovio do fariĝis 19-jara. Honore al tiu dato oni disaŭdigis ekstrakton el la aŭtentika unua E-elsendo. Laŭ ĝi la E-elsendoj el Varsovio estas la daŭrigo de la verko de d-ro Zamenhof. - En Nürnberg ni bone aŭdis Portugalan Radion, Radion Vatikanan, Romon kaj Svisan Radion.